

Esperanto en Svislando, 8-a parto
Saĝo kaj disciplino, konsiloj de Zamenhof
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 445 1972.04.19 & 22

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum prelegaro ni prezentas al vi historion de la esperanto-movado en Svislando helpe de tekstoj, kiujn ni ĉerpas el la revuo *Svisa Espero*.

A.- Inter 1887 kaj 1907 ne estas malofte trovi en la esperanto-gazetoj alvokojn favorajn al la respektado de la zamenhofa lingvo-uzo. Ankaŭ en *Svisa Espero* ni trovas similajn alvokojn. Ekzemple la Komitato de Svisa Esperanto-Societo malfermas la jaron 1904 per tiu ĉi alvoko :

Cl.- « Ni devas [...] memori al niaj amikoj komencante tiun novan jaron, ke organo de l'*Svisa Esperanta Societo* ne povos akcepti iajn diskutojn aŭ proponojn de ŝanĝoj en la principo de nia lingvo. [...] Nia lingvo estas kontentige fleksebla kaj riĉa por ĉiuj temoj ; pli bone, ĝi vivas kaj tio sufiĉas. Nia devo estas ĝin ne kritiki sed disvastigi, kaj ĉiuj svisaj esperantistoj tion memoru ! Dubo, pri ia ajn vorto aŭ gramatika problemo ofte aperis sur niaj lipoj, tion ni konfesas, sed ĉiufoje, post pripenso ni komprenis la kialon de l' fakto kiu nin turmentis kaj ni pensis ke nia estro, la modesta sed genia Varsovia kuracisto estis prava. »

A.- En la sekva numero, en marto 1904, *Svisa Espero* aperigas leteron de Doktoro Zamenhof mem. (Oni tiam ankoraŭ skribis **Samenhof**). En ĝi Zamenhof priskribis la principojn, sur kiuj devas esti organizata Internacia Kongreso de Esperantistoj. Por Zamenhof tia kongreso

Cl.- « devas esti bone kaj zorge aranĝita, havi multe da partoprenantoj kaj havi la karakteron de granda, solena kaj impona **fest**o de internacia frateco, por ke la gazetoj multe parolu pri ĝi kaj ke ĝi estu plena de entuziasmo kaj veku en la tuta mondo entuziasmon kaj deziron aliĝi al ni. Krom paroloj oni devas aranĝi komunajn kantojn en Esperanto, eble eĉ ian internacian ludon aŭ publikan konkurson ; oni devas aranĝi en la granda teatro prezentadon de dramo en Esperanto. Oni devas antaŭe eksciti la interesiĝon de la tuta urbo por ke al ĉiuj festoj de la kongreso venu grandega multo da gastoj ne esperantistoj ; per unu vorto, ni devas fari grandan **impreson** kaj devigi la tutan mondon paroli pri la Kongreso. »

A.- Post tiuj konsiloj, kiuj tutcerte multe influis la organizantojn de la unua Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos unu jaron poste en Boulogne-sur-Mer, Zamenhof tuŝas la lingvo-demandojn. Ni ree citas lin :

Cl.- « En la Kongreso oni devas paroli pri organizado de nia afero, reciproka helpo en la batalado, pri rimedoj de propagando, pri kreado de granda kaj utila literaturo, k.t.p. sed **nenion**, absolute nenion oni devas paroli pri **ŝanĝoj** aŭ **plibonigoj** ! Por ke nia lingvo atingu sian celon kaj ne disfalu kiel Volapük, ĝi devas resti por ni absolute **netuŝebla**, tiel same kiel ĉiu alia lingvo, en kiu nenia persono ja kuraĝus proponi iajn reformojn, kvankam ĉiuj el tiuj lingvoj estas multe malpli perfektaj ol nia. »

A.- Zamenhof poste esprimas la esperon, ke foje ekzistos ia konstanta « Centra Komitato » aŭ Akademio, kiu havos la rajton solvadi ĉiujn dubajn demandojn. Sed fari ŝanĝojn en la lingvo la Komitato **ne** havos la rajton. Kaj Zamenhof revenas al la temo reformoj. Ni citas lin :

Cl.- « *Sed ĉu Centra Komitato estos fondita aŭ ne – tiu-ĉi demando tute ne devas maltrankviligi niajn amikojn, ĉiaj paroloj pri reformoj aŭ plibonigoj tute ne devas vin maltrankviligi, ĉar ili havas nenian celon nek estontecon. Ĉu Centra Komitato estos fondita aŭ ne – unu principo staras kaj devas stari tute forte, kaj la tuta mondo esperantista en la nuna tempo komprenas ĝin tre bone kaj certe batalos unuanime kontraŭ ĉiu ektuŝo de tiu principo : tiu ĉi principo estas :*

A.- *simile al ĉiu alia lingvo Esperanto devas esti rigardata kiel lingvo **finita** kaj **netuŝebla**.*

Cl.- *Kaj Zamenhof daŭrigas : Paroli pri iaj plibonigoj (se ili estos efektive necesaj) ni povos nur tiam, kiam nia lingvo estos jam **oficiale akceptita** en la tuta mondo. Ĝis tiu tempo la netuŝebleco de la lingvo estas la **plej fundamenta** kondiĉo por nia progresado.*

A.- Zamenhof konkludas per tiuj vortoj :

Cl.- *Mi parolas tion ĉi ne kiel **aŭtoro** de la lingvo, sed kiel **simpla esperantisto**, kiu ne deziras, ke nia afero disfalu, kiel la afero de Volapük.*

A.- La Komitato de Svisa Esperanto-Societo aldonas:

Cl.- *Ni tre dankas nian karan majstron, ke li publike kaj tiel klare montris al ni la vojon. Nun estas nia devo, nerigardante flanken eniri konfide ĉi-tiun vojon lumigatan per la verda stelo. »*

A.- Oni tuj rimarkas diferencon en la prilingva-argumentado. Al tiu de Zamenhof la Komitato nur aldonas verdstelaĵojn. Sed tamen ĝi anoncas, ke ĝi estus preta organizi kongreson. Ni citas :

Cl.- « *Pretendon en koro ni povas havi : ke iam, kiam favora tempo venos, nia lando gastigu la esperantistojn en internacia Kongreso, en paca festa kunveno. Por tion meriti, ni laboru ! »*

A.- Ĝi fakte bone laboris, ĉar du jarojn poste la dua Universala Kongreso de Esperanto okazos en Ĝenevo.

Cl.- Tiu periodo de nia movado, kiu estas karakterizata de prilingvaj diskutoj, trovos sian konkludon en la unua Universala Kongreso de Esperanto dank'al la akceptado de *Deklaracio pri esenco de Esperantismo*, kiu bone difinas, kio estas Esperantismo, Esperanto kaj Esperantisto. Ni havos la okazon legi al vi erojn el tiu grava Deklaracio, kiu efektive ĉesigis la lingvajn diskutojn, kiuj karakterizis la dudek unuajn jarojn de nia historio. Unu el la konsekvencoj de tiu Deklaracio estos la Ido-skismo. Ankaŭ pri tio ni parolos.

A.- Pli ol sesdek jarojn post tiu periodo oni povas admiri la saĝon kaj disciplinon de la tiamaj esperantistoj. Kvankam ne ekzistis organizita movado, tamen la unuecigaj fortoj montriĝis pli fortaj, ol la disigaj. Jen pruvo, ke ĉirkaŭ Esperanto naskiĝis vera etnio aŭ nova civilizo.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!